GISTO – Okt.09
Str. Esperanto, 880 – 95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Senpage por VK-ĉeestantoj
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00.

.....

POLEMIKA AFERO

Niaj karaj Solon kaj Cezar kaj eble aliaj opinias malsame ol mi, rilate al la Eduka Ministerio en Brazilo. Jen mia opinio pri Eduka Ministerio: la nomo, Eduka Ministerio trompe pensigas ke la gelernantoj ricevos edukadon post kiam ili enskribiĝis en iu ajn brazila lernejo tamen, kiu el ni neniam aŭdis gepatrojn minace diri al siaj etuloj “nur atendu, mia kara bubaĉo, la instruistino instruos al vi obeemon kaj bonordon” post kiam ili malobee kontraŭstaris farendaĵojn, ekzemple etajn hejmlaborojn helpe al panjo. La gepatroj devus instrui al ili civitanajn devojn: etendi la dekstran manon dum saluto al fremda homo, ne mensogi, ne ŝteli monerojn, plene respekti siajn kolegojn k geinstruistojn, stariĝi kiam envenas la klason lerneja aŭtoritatulo, depreni la ĉapon respekte al la nacia flago, ktp...

Nun, jen mia propono de antaŭ pluraj jaroj, pere de la instruistaro de mia municipo kaj eĉ leteroj al guberniestroj elvokante ilian atenton al la fakto ke bonedukiteco devus veni de la hejmo. Dume la krimado prosperas tra la tuta lando. Facile observeblas ke ege malmultaj gepatroj havas bonedukon sufiĉan por transdoni ĝin al siaj infanoj.

La geinstruistoj, oni scias, havas salajron ne sufiĉan, krome ili estas dungitaj por instrui la bazajn lernobjektojn. Per tiu oni komprenas, instrui la skribon/legadon kaj scii matematikon, celobjektoj utilaj por la tuta vivo, NE por eduki diabletojn kiuj ŝotas la gambojn de la instruisto, kraĉas la vizaĝon aŭ eĉ minacas kaj agresas ilin, per armiloj, kiam ili meritis nulon en ekzameno...!!

Post pravigo, jen mia opinio, por savi Brazilon de tajdo el perfortoj kaj krimadoj ĉiuspecaj: nialanda federacia registaro devas teni du ministeriojn, la Instruan Ministerion kaj la Edukan Ministerion, ĉi-lastan por gepatroj kaj infanoj, por vere eduki. Ne sufiĉas la nocio, ke gefiloj nomu siajn gepatrojn sinjoro/sinjorino, por consideri plena la edukitecon de homo. Sen tio nia socio fariĝas popolaĉo ne inda je respekto.Ĉu bona anĝelo ne flustras en viajn orelojn la senton, ke komercaj rivaloj lerte telegvidas mise nialandajn eŭforiajn aŭtoritatulojn, kun la celo bremsi nian prosperon ? – Restas al ni veki klerulojn, prezenti la danĝeran problemon kaj helpon peti.

GEA-KUNSIDO

Dum per-skajpa babilado mi aŭdis ke nia diligenta prezidanto Zageto (ĉu tiel?) laŭdinde elstariĝas en sia posteno per sia diligenta ĉeesto. Li aktivas malsame ol la antaŭa fuŝulo, kiu facile promesis aferojn se ne plenumis.

“AKTIVIA”

Grava averto cirkuladas tra la Internet, nepre disvastigenda: la helpnutraĵo jogurto surmerkatata kun la nomo ACTIVIA, laŭ denonco de la nutristino Marilia C.Duarte, enhavas eĉ eskrementon en ĝia formulo kaj danĝeras, se uzata dum longa tempo. Ĉiu nepre devas legi la tutan mesaĝon. Kiu interesiĝas sendu al mi sian elektronan adreson. Kaj, bv ne forgesi aktualigi ĝin, kiam okazas ŝanĝo !

MEMORAĴOJ

Iam per Gisto mi invitis vin surpaperigi erojn ĉ.10 liniojn, de viaj vivoj, por ke la gekompanoj sciu pri personaj detaloj viaj. Ĉiuj ignoris min. Restas al mi plenigi la paĝon per miaj sensignifaj memoraĵoj. – Iam, fraŭlo, fluga skipano por Varig, mi loĝis ĉe familio Israel. Estris ĝin Otto Israel, germana enmigrinto, edzino Toni kaj filo plus filino. Sinjorino Toni Zorgis pri mia komforto kaj ĝustatempa deĵoro, en domo situita ĉirkaŭ 10 min. for de la flughaveno de POA. Tra la pordo kiu disigis mian ĉambron oni boris truon kaj tra ĝi funkciis "vekhorloĝo mane ĝustigita. Sufiĉis indiki la horon kiam mi devis ellitiĝi. Frumatene ŝi vekis min, pretigis kafon kaj servadis ĝin al mi. - Kiam venis libera tago por mi, Sinjoro Otto, admiranto de flugoj kaj avioj, kutimis pretigi ĉimaronon, kiun ni sorbis dum babilado. Iam mi petis lin klarigi, kial li ĉiam deziris al mi, ĉiufoje kiam mi adiaŭis por deĵoro, (mi deziras) "Glük ab!" Tio signifas: sorton malsupren. Kial ne, sorton dum la flugado? – Li klarigis, neniel valoras trankvila flugado, se dum la surteriĝo, pro iu neatenditaĵo, la avio kraŝas, kun vi ene. – Ni interŝanĝe rakontis okazintaĵojn. Li, sufiĉe klera homo, pritraktis temojn pri kiuj restis al mi diri, jes ja, vi pravas, al kiu li kutimis ŝerce surprizi per sia aserto "Ich habe immer Recht, manchmal auch senkrecht" Mi provas klarigi: Recht = (esti)prava...(esti)rajta. - Senken= subakvigi=dronigi. Klera leganto eble jam komprenis la vortludon kiu celis, moki pri si mem, t.e., mildigi la egoisman aserton: "mi ĉiam pravas (pri ĉio)".Tradukite: mi ĉiam pravas(rajtas) tamen ofte mi rajtas subakviĝi=droni."

La manieron de germanoj informi la horon, mi aŭdis unuan fojon de sinjoro Otto kaj ne tuj komprenis. Ekzemple: ein Firtel Fünf, signifas:umu kvarono (de horo) eluzita de la plena horo antaŭ la kvina (horo). En Esperanto, malkomplike, klara kaj pura: (estas la) kvara kaj kvarono.

Bonvenas iomete rideti.

FRIPONETAĴO

Bubaĉo ĉ.kvinjaraĝa staras sur siaj piedfingroj kaj provas atingi butonon de enhejma sonorilo. Gardisto apude staranta observas la klopodon de la sensukcesa knabeto kaj demandas, ĉu li povas helpi. La knabo jesas, la gardisto premas la butonon kaj ili atente aŭskultas. La gardisto demandas: kion fari nun? La friponeto diras: ni haste forkuru.

KORUPTO

Guberniestro diskursas antaŭ granda publiko kaj deklaras: - "En mia gubernio, mi garantias al vi, ne estas spaco por iu ajn koruptulo! Unu ĉeestanto laŭte demandas: - "Ĉu via laborskipo estas jam kompleta?"

EN POLICEJO

Policisto comisiita elsarki konfeson de ŝtelisto demandas: "Kie estas la juveloj?" La ulo insistas diri, ke li ne scias kaj denove la policisto subakvigas la kapon de la fripono en barelo plena de malpura akvo, dum kvardek sekundoj kaj redemandas: Kie la juveloj? La respondo daŭras: mi ne scias. Post la tria aŭ kvara dronigo je ĉiufoje pli longa tempo, la ulo jam preskaŭ sveninta diras: oni devas ellasi la akvon por ke mi povos trovi la juvelojn.

BOPATRINO

Amikoj babilas. - Feliĉa estis Adamo, kiu ne havis bopatrinon.
- Sed li havis serpenton. Tio samas.

ĈU ĈIUJ AVARULAS? PIGRAS? ĈU NENIU LEGIS AŬ AŬDIS ANEKDOTON INDAN JE LEGO DE NIAJ KOMPANOJ? Gisto atendas !